



# Norvega Esperantisto


ESP ERANTOBLADET

N-ro 1  
1966

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
ĈEFREDAKTORO : JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo  
32-a (37-a) jaro  
Monata

## MONUMENTO PRI ZAMENHOF starigota en Bjalistoko



La ideo pri starigo de monumento al Zamenhof en la urbo de lia naskiĝo, Bjalistoko, jam de longe okupis multajn samideanojn. La unuaj paŝoj al realigo de tiu celo estis faritaj en la jaro 1932, sed la baldaŭ sekvinta dua mondmilito neniigis ĉiujn tiamajn planojn kaj projektojn.

Okaze de la jubilea jaro 1959/1960 la malnova ideo reviviĝis kaj atendas plenumon. Dank' al financa helpo de la Registaro de Pola Popola Respubliko oni anoncis konkurson, rezulte de kiu estis elektita la verko de la pola artisto Stanislaw Lisowski. Ĝi prezentas iom simbole la statuon de Zamenhof skulptotan en granito. En la tagoj de 44-a U.K. de Esperanto en Varsovio oni metis en Bjalistoko fundoŝtonon de la monumento. La 44-a U.K. de Esperanto deklaris por tiu agado sian plenan apogon kaj apelacii al la esperantistaro esprimi subtenon laŭ sia kapaolo.

Dezirante akiri la necesajn monrimedojn kaj samtempe ebligi al kiel

eble plej granda nombro da personoj en la tuta mondo partoprenon en konstruo de la monumento, la Komitato (konsistanta el membroj de Veterana Esperanto-Klubo, reprezentantoj de urbaj aŭtoritatoj kaj civitanoj de Bjalistoko kaj membroj de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio), vokas ĉiujn esperantistojn kaj simpatiantojn de Esperanto al aĉetado de «brikoj» por la monumento.

La «brikoj» estas presitaj en formo de bankbileto kun portreto de L. Zamenhof (bildon pri la «briko» vi trovas aliloke en la gazeto). La vendo-prezo estas fiksita je unu us. dolaro, aŭ ĝia egalvaloro en valuto de koncerna lando. La tuta profito estas destinita por konstruo de la monumento al Zamenhof en Bjalistoko. La nomo de ĉiu donacinto estos notita en speciala kartoteko konstante gardata en la muzeo de Bjalistoko.

Lige kun tio ni alvokas ankaŭ al Vi! Bonvolu mendi ian provizon da brikoj kaj disvendi ilin kiel eble plej rapide inter gesamideanoj. Ĉiu mendanto de pli ol 50 brikoj ricevos 10 % rabaton kiel premio. Kolektitan monsumon bonvolu enpagi je jena adreso: Spoleczny Komitet Budowy Pomnika dr. Ludwika Zamenhofs w Białymstoku — Polska — Narodowy Bank Polski, I Oddział Miejski Białymstoku nr. 102-9-561.

Estas menciinde, ke polaj Esperantistoj aĉetas jam analogiajn brikojn.

La Komitato fidas, ke ĉiu samideano oferos sian obolon por honorigi memoron de la homo, kiu kreis la karan por ni, internacian lingvon — Esperanto.

Prez. de la Komitato Sekretario  
Jerzy Krochmalski Nina Liborska

En la nomo de Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio  
Prezidanto de Filio de P.E.A. en Bjalistoko

Lech Piotrowski

## Esperanto en la norvega radio

Fine malfermiĝis la pordo al N.R.K. por Esperanto! La prez. de Klubo Esperantista en Oslo, John Berggreen, ricevis permeson paroli pri Esperanto dum 15 minutoj. La elsendo okazos ĵaŭdon la 27-an de januaro 1966 je horo 11.35—11.50. La tempo ne estas tro konvena, sed provizore ne estas eble havi vesperan tempon. Sed, se post la elsendo venus sufiĉe multaj petoj pri nova elsendo (ripetado) vespera, estus ŝanco ke tio okazus. Do skribu amase al N.R.K. petante ripetitan elsendon *vesperan!*

La prezentado (kiu estis surbendigita en N.R.K. 28/12-65) okazos en formo de radiointervjuo pri Esperanto, kaj samideano Berggreen skizas la historion de Esperanto, priparolas la bezonon de internacia lingvo, la disvastiĝon kaj organizaĵojn de Esperanto, ĝian praktikan kaj kulturalan valoron, kaj finas menciante nian literaturon kaj finfine li legas «En pensoj» de Herman Wildenvey, tradukita esperantlingven de Lars Kaare Hunnes. La intervjuanto nome estas la filino de Herman Wildenvey, s-ino Lillian Sonning. Ŝi nun laboras en la Informada Sekcio de N.R.K. kaj jam estas tre fervora al Esperanto; do bona signo por estonta eluzo de NRK!

JB.

### Informo de la Pola Radio

Al ĉiu, kiu skribos rekte al nia redakcio (Pola Radio, Esperantaj Disaŭdigoj, Varsovio, Pollando), ni senpage sendos kelkajn, kaj eĉ pli multe da niaj koloraj aktualaj programfolioj.

## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,  
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo  
Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—  
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—  
1/8 p. kr. 19,—

## La kolekto al la Informadfondajo

Komenciĝas nova jaro, do nova ebleco plivigli la kolekton al la Informadfondajo de N.E.L. Ĉi tiu agado ne finis aŭ finos, sed *daŭras senĉese*. En nia moderna tempo estas nepre bezonata uzi rimedojn modernajn, interalie dissendi ĉiuspecajn informaĵojn pri nia movado, sed tio kostas monon. Do ni bezonas monon por plifortigi la informadan servon pri Esperanto. Sed ne estas facile peti monon de neesperantistoj, kaj inter niaj propraj vicoj ŝajne mankas riĉulo donacema, ĉar en la lastaj du jaroj ni vane serĉis filantropon.

Sed estas alia vojo uzebla: Se parto de la tuta esperantistaro en Norvegujo — ekzemple 650 personoj — ĉiujare donacus po 5 kronojn pere de la 5-kronuludo al la Informadfondajo, ni en la tempo de 3 jaroj havus proks. kr. 10 000. Sole la rentoj de tiu sumo jam helpus nin efektive ĉiujare fari novajn paŝojn en la informada kampo. Do ne hezitu, sed faru tuj vian kontribuon novan, kaj se vi hazarde ie aŭdus pri vakanta filantropo (!), ni petas vin flustru iom pri nia deziro en lian oreilon — aŭ donu al ni urĝan

sciigon pri via eltrovaĵo por ke ni mem vizitu lin!

Dankante pro ĉiuj mondonacoj ĝis nun, ni antaŭdankas ĉiujn donontojn!

## Sciigoj de N.E.L.

*Norvega Esperantisto*. — Se vi deziras eviti interrompon en la ricevado de la gazeto, ni varme petas vin bonvolu tuj pagi vian kotizon. — La *rektaj membroj* bonvolu tuj sendi sian kotizon al N.E.L., Boks 942, Oslo 1 (poŝtĝirokonto 100.30), la *klubanoj* bonvolu tuj pagi sian kotizon al la kluba kasisto. Kaj al la *klubaj* kasistoj ni same varme petas: bonvolu *senprokraste* aktive ekagi por kolekti la kotizojn de la klubanoj, kiuj ankoraŭ ne pagis por 1966, kaj ĉiukaze sendi al ni liston kaj kotizojn por la jam pagintaj klubanoj plej malfrue en la unua semajno de februaro. Antaŭan dankon!

*Subtenantaj membroj*. Ni petas ĉiujn membrojn, kiuj havas okazon por tio, anonci sin kiel subtenantajn membrojn de N.E.L. La kotizo estas kr. 30,00 por unu jaro. Klubano pagas kr. 15,00 aldone al sia klubkotizo.

*Apogmembroj*. Ni petas ĉiujn membrojn varbi apogmembrojn (kr. 5,00). Ĉi tiu kategorio celas neesperantistojn, kiuj estas pretaj apogi nian laboron per malgranda subteno; ili ricevas la jarraporton.

*51-a Universala Kongreso de Esperanto* okazos en Budapeŝto 30. julio—6. aŭg. 1966. Turisma Servo de N.E.L. laŭ peto sendos bultenojn kaj aliĝilojn, akceptas aliĝilojn kaj mendojn, kaj plenas komunan vojaĝon norvegan.

Junula kongreso okazos en Pécs, Hungarujo, tuj post la U.K. Interesiĝantoj skribu al la Turisma Servo de N.E.L. pri informoj.

La kontorfondaĵo. Ni permesas al ni memorigi pri tiu grava donacofondaĵo. Ĉiuj donacoj estas bona helpo por la ekonomio de N.E.L.

Taskotabelo por kluboj. Febr. La studgvidanto kontrolas la laboron de la studrondoj kaj klopodas fondi novajn studrondojn. Antaŭ la 15a la sekretario sendas jarraporton pri la pasinta jaro al NEL kaj al la distrikto (bl. A 11). La kasisto sendas skriban kotizpostulon al ĉiuj nepagintaj klubanoj, kun plenigita poŝtĝirokarto aŭ poŝtmandato, informante ke post unu monato oni eventuale sendos poŝtan enkasigilon.

Estrarkunveno planas la martajn kunvenojn.

Raporto de la Liga Estraro pri la 4a jarkvarono. Okazis 1 estrarkunveno. Oni dissendis 2 cirkulerojn al la kluboj, unu el ili ankaŭ al la rektaj membroj (i. a. pri donacabonoj de Norvega Esperantisto). — Oni decidis ne okazigi landan kunvenon en 1966, sed proponi kunvenon de la Liga Konsilantaro. Oni diskutis reaktivigon de malfortaj kluboj kaj rekreskigon de la membronombraro. Oni entreprenis norveglingvan tradukon de dokumento C.E. D./7. Reisetrafikkforeningen for Oslo decidis eldoni novan turistbroŝuron pri Oslo — ĉi-foje en 40 000 ekzempl. Oni intertraktas kun la eldonejo Dreyer pri transpreno de la restanta stoko de la norveglingva eldono de Privat «Ludwik Zamenhof, skaperen av Esperanto.» La Liga Estraro.

## 5-kronrulado al la Informadfondaĵo de N.E.L.

Listo 8:

Jenaj donacis 5 kronojn:

Gustav Ringstad, Torp p. å.	
Beryl Jensen	Oslo
Laila Kahrs	»
Kjell Berggreen	»
Edvard Larsen Aas	»
Gunvor Engnæs	»
Sigrid Dietrichsen	»
Nanna Fridriksen	»
Hans Berglie	» (kr. 10)
Th. Andersen	»
John Berggreen	»

Entute 11 donacintoj, sume kr. 60,00.

## 5-a Internakta Kultura Semajno en «Gresillon»

La 5a Paska Kultura Semajno, sub la aŭspicioj de la Ministerio pri Franca Edukado, okazos de la 1a ĝis la 8a de aprilo 1966 en la kastelo «Grésillon» — Baugé (Maine-et-Loire).

Eminentaj esperantistoj prelegos pri diversaj temoj precipe kulturaj kaj, praktikaj kursoj, ludoj, distraj vesperoj, ekskurso al la kasteloj de la «Loire» okazos dum tiu semajno.

Oni ankaŭ oferdonos, dum tiu epoko, senpagan restadon al 5 eksterlandanaj gejunuloj.

Petu klarigojn pri la kosto de la restado kaj, pri rabatiloj por la fervojoj al:

S-ro BABIN, Lycée Pierre Loti, 5, Boulevard Buisson, 17 - ROCHEFORT-SUR-MER (Francujo).

René Llech-Walter,  
Prezidanto de U.F.E.

RYSZARD KRASKO:

## LA URBO DE ZAMENHOF

En la tempo, kiam en la negranda dometo ĉe la strato Zielona (Verda) ekvidis la tagan lumon la estonta kreinto de la internacia lingvo Esperanto, Bjalistoko estis negranda urbeto havanta signifon de loka komerca centro. En la ĉirkaŭaĵo de Bjalistoko, en najbaraj vilaĝoj kaj urbetoj, estis jam fakte kreiganta la teksindustrio, kiu dum la plej proksimaj kelkdek jaroj estis revoluciiganta la vivon de la homoj enloĝantaj ĉi tiujn dormemajn urbetojn de la provinco Podlasie, sed en Bjalistoko mem estis apenaŭ kelkaj manufakturoj. La urbeto vigliĝis nur unu fojon semajne, kiam sur la centra placo ĉe la urbodomo ariĝadis la eskalveturiloj de kamparanoj alvenantaj el la najbaraj vilaĝoj. Ĉe la buŝo de la strato Zielona, kondukanta ĝuste al tiu ĉi marĉandejo, oni faris mizerajn komercajn transakciojn, oni aĉetis ovojn, kokinojn, farunon, griojn, terpomojn. Kaj ĉi tiujn transakciojn, kiel okazas sur marĉandejo, akompanis violentaj disputoj, kvereloj foje gvidataj en kvin lingvoj: pola, rusa, germana, juda kaj blankrusa. De tempo al tempo aŭdiĝis ankaŭ litova vorto, ĉar ankaŭ litovoj,

kvankam en negranda nombro, loĝis en la ĉirkaŭaĵo. Ĉu oni povas miri, ke la malgranda Ludoviko, inspirita per tiu ĉi diverslingva voĉbruo, verkis kvinaktan tragedion titolitan «Babelturo». La agado de tiu ĉi tragedio, perdiĝinta cetere kaj konata nur laŭ la rakontoj de la nombraj gefratoj de la kreinto de Esperanto, okazis ĝuste sur la bjalistoka urboplando.

Bjalistoko situas sur la etnika lim-regiono pola-rusa-litova. La plej malnova dokumento, en kiu ni trovas la unuan mencion pri tiu ĉi loko, datita je la 1425 jaro, skribita estis en la rusa lingvo, kaj subskribis ĝin la litova duko Vitoldo. Bjalistoko, kune kun la aliaj ĉirkaŭantaj ĝin urbetoj kaj vilaĝoj, transiradis poste de manoj al manoj. Fine, en la 1569 jaro, post la subskribo de la unio inter Pollando kaj Litvo, kune kun la vojevodio de Podlasie, sur kies tereno ĝi kuŝis, Bjalistoko definitive ek troviĝis inter la limoj de Pollando, sed ĝi situis rande, sekve la loĝantara situacio tute ne ŝanĝiĝis ĉi tie.

En la mezo de la XVII jarcento la hereda posedanto de Bjalistoko fariĝas Stefano Czarniecki, al kiu rekone

«Briko»  
kun la portreto  
de Zamenhof. Per  
aĉeto de brikoj  
oni kontribuas al  
starigo de la  
monumento.  
(Vidu artikolon p. 1)



pri la elstaraj meritoj dum la bataloj kontraŭ Svedujo oni donis premion — la starostion de Tykocin kun la urboj Tykocin kaj Bjalistoko. La filino de Czarniecki enportis sekve kiel doton la starostion de Gryfitów al la familio Branicki, malnova, bonstata pola gento. Pli malpli en la sama tempo, ĉirkaŭ la jaro 1665, Bjalistoko ricevis la urbajn rajtojn.

La ricevo de la magdeburgaj rajtoj ne havis grandan influon sur la evoluon de la urbo. Plue ĝi estis malgranda setlejo, enloĝata ĉefe de kamparanoj; la nemultaj metiistoj produktis nur tiom, kiom postulis la lokaj bezonoj. Nur en la komenco de la XVIII jarcento, kiam en Bjalistoko komencis regi la pranepo de Czarniecki - Jan Klemens Branicki, la urbo vigliĝis.

La fiera magnato, kiu junaĝe ricevis la titolon de kronhetmano, alie la plej altranga estro de la polaj armeoj, plenumanta krome vicon da aliaj funkcioj kaj postenoj ŝtataj, decidis fari en Bjalistoko sian rezidejon. Li konstruigis ĉi tie grandegan palacon en la malfrubaroka stilo, ĉirkaŭigis ĝin per grandioza parko kaj ĝardenoj, alikonstruis de la fundamentoj la tutan urbeton, indikinte rektajn, pavimitajn stratojn kun flanke plantitaj arboj kaj ĉe tiuj ĉi stratoj li konstruigis unuecajn, stilajn domojn. Tiele aliformita Bjalistoko dum longaj jaroj portis la nomo «Versajlo de Podlasie», ĉar efektive ĝi iom similis la sidejon de la francaj reĝoj.

Tiu ĉi unua periodo de la brileco de Bjalistoko daŭris mallonge. La maljuna hetmano mortis, la heredintoj vendis Bjalistokon al la prusa reĝo, tiu ĉi laŭvice — al la rusa imperiestro. La metiistoj, arigitaj de Branicki, formigris en la mondon serĉante pli bonajn enspezojn, la urbeto denove fariĝis kamparana setlejo, per tio nur diferenca disde la ĉirkaŭaj urbetoj,

ke estis ĉi tie belstila preĝejo, grandega palaco, mezlernejo, nu kaj la urbodomo, ĉirkaŭe de kiu unu fojon semajne, jaŭde, estis okazanta la menciita supre marĉandado.

Kiam Ludoviko kune kun sia patro, instruisto pri la rusa lingvo, kaj kun la cetera familio forveturis al Varsovio, Bjalistoko travivadis ĝuste la komencon de nova renesanco. Kvazaŭ fungoj post pluvo establiĝis ĉi tie teksfabrikoj fondataj de reenmigrintoj. Inter Varsovio kaj Bjalistoko kreiĝis fervoja linio, poste oni konstruis ankoraŭ liniojn kunligantajn Bjalistokon kun malproksimaj urboj de Ukraino kaj tra Elk kun la apudbalta Królewiec. En la urbo ĉi ekvarmis miloj da novaj alvenintoj, laboristoj, majstroj, metiistoj, komercistoj. Sur ĝiaj stratoj ekregis voĉbruo ankoraŭ pli diverslingva, ol antaŭe. De jaro al jaro la urbo kreskis: en 1872 ĝi havis 16 500 loĝantojn, en 1880 jam 34 500, kaj dek kvin jaroj pli poste: 62 500. Kreskis ankaŭ la najbaraj industriaj vilaĝoj: Wygoda, Skorupy, Dojlidy, Antoniuk, Marczuk. En tiu tempo oni komencis nomi Bjalistokon «la Manĉestro de la Nordo», ĉar - simile kiel la angla Manĉestro - ĝi estis industria centro konsistanta el tuta komplekso da malgrandaj vilaĝoj kaj urbetoj. Kiam eksplodis la unua mondmilito, Bjalistoko havis jam preskaŭ 110 mil.

Tion, kio restis el Bjalistoko post la finiĝo de la lasta milito, eĉ malfacile estis nomi urbo. El la pli ol 120 teksfabrikoj saviĝis nur tiuj, kiuj estis tro malgrandaj, por ke povu trafi ilin bombo, aŭ tro mizeraj, por ke la hitleraj soldataĉoj bonvolu forbruligi ilin. El la grandaj fabrikoj, iam produktantaj drapon, ĉapelojn, pluŝon kaj tiom da aliaj artikloj alte taksataj sur la fremdlandaj merkatoj de preskaŭ la tuta mondo, restis nur rubaĵoj kaj pikantaj la ĉielon, solecaj, jam de neniu bezonataj kamentuboj.

La tuta centro de la urbo kuŝis en ruinoj. Malaperis de sur la tersurfaco la urbodomo, malaperis la domoj ĉirkaŭantaj la urboplacon, la strato, ĉe kiu naskiĝis Ludoviko Zamenhof, jam antaŭ la milito baptita per lia nomo, simile kiel la dekoj da aliaj stratoj, kuŝis en ruinoj. Ŝajnis, ke tio ĉi estas jam la fino, ke post tiu ĉi frapego la urbo jam neniam leviĝos. Ĉar kia estonto povis do atendi Bjalistokon, se 86 procentojn de la urbo formis ruinoj, kaj el la 110 mil loĝantoj restis apenaŭ ĉirkaŭ 45 mil.

Sed jam tiam, antaŭ dudek jaroj, kiam apud Vistulo kaj apud la lima Odra ankoraŭ ruliĝis la milito, ĉi tie, en Bjalistoko, alvenis la tempo de rekonstruo.

Kiel unu el la unuaj oni rekonstruis la centran kvartalon, sur kies tereno situas ankaŭ la strato de Ludoviko Zamenhof. La dometo, en kiu naskiĝis la kreinto de la lingvo Esperanto estis detruita ankoraŭ en la tempo, kiam pri la memoraĵoj de la historio oni ne zorgis tiel, kiel hodiaŭ. Kaj domaĝe, ĉar eble ankaŭ ĝi estus tiel pietisme restaŭrita, kiel la dekoj da aliaj antikvaĵoj. Kvankam, aliflanke, kion farus ĉi tie la ligna dometo inter la altaj, pluretaĝaj domoj. Al la murego, kiu staras pli malpli tie, kie naskiĝis kaj pasigis la infanajn jarojn Zamenhof, oni alfiksis memortabulon.

Oni rekonstruis ankaŭ kvartalojn. Unue la malnovajn, ĉe la centro de la urbo. Per ŝarĝaŭtomobiloj kaj vagonetoj de mallarĝtraka fervojo, dum multaj monatoj, oni forveturigadis la rubaĵojn ekster la urbon, oni ŝutis ilin sur la humidajn herbejojn laŭe de Bialka — la «blazona» rivero de Bjalistoko. Poste, tie kie iam estis la zigzagaj, mallarĝaj stratetoj kaj sakstratetoj, komencis kreiĝi larĝaj stratoj. Da loko estis multe, ĉe kelkiuj stratoj ne saviĝis eĉ unu domo, kiu povus iamaniere ĝeni la liberon de

la urbanistoj. Kaj ĉe la stratoj, unue nekuraĝe, po dekelkaj jare, komencis kreski novaj domoj.

Bjalistoko komencis pleniĝi de homoj. Al la rekonstruitaj industriaj entreprenoj komencis flui homoj el la najbaraj urbetoj kaj vilaĝoj. Ĉiun jaron alfluadis miloj da ili. Ili konstruis novajn loĝdomojn, vendejojn, lernejojn, kinejojn. Ili establis skvarojn kaj parkojn.

Hodiaŭ Bjalistoko kalkulas jam pli ol 130 mil loĝantojn kaj kun ĉiu jaro ĝi kreskas. Tie, kie antaŭ 25 jaroj kreskis terpomoj kaj legomoj — hodiaŭ staras jam tutaj loĝkvartaloj. En la dekoj da novaj lernejoj edukiĝas miloj da infanoj. En unu el ili, portanta la nomon de Ludoviko Zamenhof, la infanoj lernas ankaŭ la lingvon Esperanto. Tie, kie staras ĉi tiu lernejo, ne nur en la tempo de Zamenhof, sed ankoraŭ antaŭ 20 jaroj, estis marĉejoj. Hodiaŭ trakuras tie unu el la ĉefaj arterioj de la moderna Bjalistoko.

Bjalistoko havas nemulte da arkitekturaj antikvaĵoj. Kiel ĉiu fabrika urbo, ĝi konsistis el plektaĵo de stratetoj perkonstruitaj de ludomoj malhavantaj stilon, belecon, ornamaĵojn. Sed tiuj ĉi nemultaj antikvaĵoj, kiuj transdaŭris ĉi tie el la tempo de la «Versajlo de Podlasie» kaj el pli fruaj periodoj, estas zorgeme rekonstruitaj.

Denove do staras sur la mezo de la malnova urboplacon, portanta la nomon «Urboplacon de Kościuszko», la baroka urbodomo, en kiu troviĝas muzeo. Oni rekonstruis la palacegon de Branicki kaj transdonis ĝin je la regado de la Medicina Akademio, la unua supera lernejo en Bjalistoko. La dua altlernejo, establita en tiu ĉi urbo post la milito, estas la Inĝenieria Lernejo, kaj post nelonge supozeble kreiĝos la tria — Supera Pedagogia Lernejo.

Sur la ruboj de la detruitaj fabrikoj

oni konstruis novajn produktojn. La malnovan Bjalistokon, tiun de antaŭ 25 jaroj, oni povas vidi hodiaŭ nur en la foraj periferioj, kiuj en la periodo de la kreiĝo de «la Manĉestro de la Nordo» estis ankoraŭ apartaj vilaĝoj: en Dojlidy, en Wygoda, Marczuk. Kvankam ankaŭ tie jam enpaŝas la moderno — novaj loĝdomoj, modernaj industriaj entreprenoj, lernejoj. La urbo de Zamenhof travivas sian trian renesancon. Post dek kvin jaroj, kiel kalkulas demografoj, ĝi kalkulos 240 mil loĝantojn, kaj laŭ la asertoj de urbanistoj — ĝi estos unu el la plej modernaj urboj en Pollando.

tradukis  
Jerzy Grum

## Parolado de nia oficiala repr. Rolf Bugge-Paŭlsen

ĉe la inaŭguro en Tokio 1/8 1965

S-ro prezidanto, estimataj gesinjoroj!

La ministerio de ekstero de Norvegujo nomis min sia reprezentanto ĉe la 50-a Universala Kongreso de Esperanto en Tokio. Nomante malnovan esperantiston por tiu tasko, nia registaro honoris ne nur min, sed la Esperanto-movadon entute — precipe la japanan Esperanto-movadon, kiu prenis sur sin la aranĝon de la ora jubileo de niaj mondkongresoj.

Estas granda ĝojo por mi stari antaŭ vi hodiaŭ salutante la 50an Universalan Kongreson de Esperanto en Tokio en la nomo de la norvega registaro. La lando de skioj kaj de elektra lumo en Eŭropo salutas plej kore la landon de skioj kaj de elektra lumo en Azio! Post la olimpiado de la gamboj vi japanoj nun invitis al la olimpiado de la kapo. Ni esperu ke baldaŭ la vico tiurilate estos la inversa.

Mi supozas ke mi ofendas nenium

dirante ke Japanlando estas la plej vigla, energia, diligenta kaj ĉiel evoluinta lando en Azio, kaj materie kaj kulture. Norvegujo, lando de maristoj, ekzemple scias alte taksi la nivelon de via ŝipkonstruado. Kaj antaŭ via malnova kulturo kaj alta etiko ni klinas nin admire kaj respekte.

Sed, niaj lingvoj estas tre malsimilaj. Dum la malmultaj tagoj, dum kiuj mi restis en via lando, mi spertis kiom malfacile estas por fremduloj igi sin komprenataj. La malfacilaĵoj estas vere grandegaj. Do, karaj inteligentaj, gastamaj japanoj, precipe gejunuloj, studentoj, helpu nin enkoduki klaran, racian kaj neŭtralan lingvon inter la naciojn! Mi havas demandon al vi, ĉeestantaj japanoj: Ĉu vi trovas Esperanton klara lingvo? (respondo: manklakado). Do, ĉar Esperanto sonas klare, ĝi certe meritas fariĝi la mondlingvo de la telefonio.

Saluton!

## Julio Baghy 75-jara

La 13-an de januaro—Julio Baghy, nia granda poeto, povis festi la 75-jaran datrevenon de sia naskiĝo.

Postfeste ni kore gratulas pro la jubileo.

†

## Nanna Dahl Johnsen mortis

La 16an de novembro 1965 forpasis s-ino Nanna Dahl Johnsen, Drøbak, dumviva membro de NEL. S-ino Dahl Johnsen estis izola esperantistino, kaj blinda, sed ŝi ĉiam fervore subtenis nian movadon, kaj preparis sin por la supera ekzameno. En bona sano ŝi partoprenis la Nordlandan Esperanto-Kongreson en Oslo en junio 1965. Ni longe memoros nian simpatian samideaninon kaj deziras pacon al ŝia memoro.

C. Støp-Bowitz.

## RECENZOJ

### Faldbroŝuro de NSB

La Norvegaj Ŝtataj Fervojoj eldonis plurkoloran faldbroŝuron en Esperanto kun dek bildoj kaj kun mapo pri Norvegujo. La mapo havas tekstojn en la lingvoj norvega, germana, angla kaj Esperanta. Rimarkindaj preseroj estas Ruslando anstataŭ Ruslando, kaj la teksto «Pramo al Danujo» en malĝusta loko. Sed la fakto, ke NSB eldonis tian broŝuron, estas per si mem promesiga, kaj ĉiu devus peti ĝin ĉe la vojaĝoficejoj. Ĝi baldaŭ elĉerpigu! Oni presu novan stokon!

### Maihaugen

Ankaŭ pri Maihaugen, la mirinda popolmuzeo en Lillehammer, estas eldonita informbroŝuro en Esperanto. Tiu broŝuro, ofsete presita, estas 30-paĝa, kun bildoj, en tre klara preso, sur altkvalita papero, kun instruaj, interesaj kaj tre detalaj informoj en tre bona Esperanta vesto. La broŝuro estas digna reprezentanto de la muzeo.

### La Fervojmuzeo

Tria broŝuro, ankaŭ eldonita okaze de la fervojista kongreso en Hamar, estas tiu de La Fervojmuzeo en Hamar. Ĝi estas malgranda, sed sufiĉa — plurkolora, kun urboplano pri Hamar kaj — kio estas la ĉefafero — ĝi estas en Esperanto.

JHR.

### Nigre-blanke

«Certe triumfos la popolo de Vjetnamio! Certe malvenkos la usonaj agresantoj!» Fremdlingva eldonejo, Pekino, 1965.

Jen kajero ilustrita nigre/blanke pri la milito en Vjetnamio. Nigre: Ĉio, kio rilatas al Sud-Vjetnamio kaj Us-

ono — blanke: Ĉio kio rilatas al la norda, al la «liberiga armeo» kaj komunismo. La bataliloj de Usono estas fiaj, dum la alia parto heroe kreas mortigajn kaptilojn fositajn en la tero kun pintigitaj bambuoj. La usonaj agresantoj forbrulas vilaĝojn, la liberiga armeo eliminis malamikajn fortopunktojn. La kajero ankaŭ donas ciferojn, nombran resumon de la «terurajn krimagoj de la usona imperiismo» kaj de la «brilaj atingoj de la popolarmeo», ciferojn pri «buĉitaj homoj» de la unu flanko, kaj de «ekstermitaj malamikoj» de la alia flanko.

Plej mirige, tamen, ke la usonanoj tiel volonte lasas sin fotografi dum torturado de vilaĝanoj, dum strangulado de juna knabo, dum dronigo de civilulo en akvobarelo.

Haro

### La reviziismo

«Daŭrigu la lukton kontraŭ la reviziismo de Ĥruŝĉov ĝis la fino», «Parolado en Aliarcham Soci-sciencia instituto de Indonezio» kaj «Granda venko de Leninismo.» — Kajeroj eldonitaj de Fremdlingva eldonejo, Pekino, 1965.

Denove tri, tre malgrandaj (9×15 cm) 16-40 paĝaj kajeroj, kies enhavo estas novaj atakoj al la reviziismo, t. e. al la oficiala politiko de Sovetunio, kaj laŭdo de Lenin kaj Stalin.

### Por la paco

«Por la paco III», eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj. Moskvo 1965.

Multobligita kajero kun artikoloj kaj poezio — i. a. estas laŭ peto de anglo, poemo de Boris Pasternak. La petinto mencias, ke li legis lian «Doktoro Jivago», kaj tial deziras koni pli pri li.

La artikoloj kondamnas la agojn de

la nazia Germanujo, skizas programon por paco — dependante de bonvolo de Usono fortiri siajn trupojn el ĉie, kie okazas bataloj, esprimas esperon ke Vjetnamio liberiĝos kaj asertas, ke soveta komunismo estas pura kaj plej bona evoluo de l' leninismo.

### Polaj kantoj

«Kantante tra Pollando». Polaj kantoj en traduko de Dobrzynski, kun muziko prilaborita de Jarzecki. Eld.: Polski Związek Esperantystow 1964.

Bela 56-paĝa kajero kun kantoj el diversaj distriktoj de Pollando, kun muzikaj notoj al ĉiu kanto. La teksto klare presita, la muziko facile legebla, la grandeco bone taŭga kaj por mano kaj por poŝo. Al kluboj kun «pola programo» tre taŭga, al kantemuloj nepre dezirinda.

### Religio, moralo, politiko

Emilo Gasso: «Monoteismo kaj pozitiva moralo», 64-paĝa kajero, depono ĉe Heroldo de Esperanto.

La kajero pritraktas religion, moralon kaj politikon. La unua parto estas plena de tia saĝo kiun norvegoj nomas «snus-fornuft», stranga miksaĵo de plej granda naivismo kaj nedigestitaj scio pri hebrea lingvo kaj kono de Bibliaj tekstoj. La aŭtoro celas miskompreni kie miskompreno eblas, kaj laŭ tiuj premisoj juĝas, ke Dio ne ekzistas, ke kristanismo, judismo kaj islamo estas falsaĵoj. Li evidente neniam eĉ aŭdis pri protestantaj eklezioj, kvankam li mencias Luther.

En la morala parto li montras dependon de heredita kristana moralo, kvankam li serĉas alian bazon. Li tial devas diskuti kio estas bono/malbono, kaj devas lasi la bazon en la aero, nur asertante, ke «pozitiva moralo ne estas fikcio, sed realaĵo, aro da leĝoj

konataj aŭ eltrovataj, kies fundamento estas la naturo de la homo» (!). Tiujn leĝojn li donas pere de citaĵoj de plimalpli famaj homoj. Ke kelkaj citaĵoj jam antaŭe troviĝas en la Biblio, li pririlencas.

Lia politiko estas tiu de transformigo de UNO al mondparlamento kun propra polica armeo, kiu povus sufoki militojn dum la naskiĝo.

Haro

### Poemaro

Aleksandro Logvin: *Sur la vivo-vojo*. Poemaro originala kaj tradukita. — Renkonto sur la vivovojo enkonduko de Ferenc Szilágyi. — Kovrilo de Jan Schaap Jr. Stafeto, Beletraj kajeroj 24. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj 1964. Prezo: 1,20 us. dolaroj.

Jen nova poemaro, laŭ la diro de la eldonisto la kvindeka volumo de li presita. Stranga koincido estas, ke li samtempe fariĝis 50-jara. — Mi kore gratulas je la duobla jubileo!

La verkisto de tiu ĉi bela poemokolekto estas ukrainano, naskita en 1903. Kvankam grave malsana li antaŭ kvin jaroj komencis «elserĉi malnovajn kajerojn kun Esperantaj poemoj, kiuj kuŝis kaŝitaj ie». Tiujn ĉi poemojn li verkis jam kiel knabo «dum tempo malfavora por Esperanto». Sed lia patro konservis liajn poemojn — en abelujo. Tio estis dum la Stalina epoko.

La «vivovojo» de la poeto estis malĝoja kaj malfeliĉa, plena de rezigno kaj manko; «ĝi estis vivo de intense defensiva homo».

Pri sia poemaro li mem diras: «Mi bonege komprenas, ke inter ili estas bagatelaĵoj, sed mi tre deziras, ke la poemaro de mia juneco ne perdiĝu.»

Ili ne perdiĝis, kaj jen ili aperas en la belaj vestoj de la Eldonejo J. Régulo. Poezi-teknike liaj versoj estas perfektaj, firme ĉarpentitaj, plenaj

de sento. Ne nur ritme senmankaj, sed kun tiu poeta svingiĝo, kiu distingas la bonan poemon de la mezbona. Tiun ĉi efekton produktas ne nur la perfekte de la rimoj sed kune kun ĝi ankaŭ la vortelektaj kaj la fraziga arto en ties muzika senco. La trilogio: Tri poemoj el versociklo «Lasta vorto de la malsanulo» estas speciale atentinda kun sia forta sentenhavo.

Jen kelkaj provoj de la poemoj, kiuj parte estas originalaj, parte tradukitaj el la rusa literaturo.

### Nirvano

Pompe silentema  
kaj trankvila  
reĝas en arbaro  
neĝofal',  
sed en mia rememor' —  
sunbrila  
majo, majo, maj'  
kun najtingal'!  
For de la tumulto  
kaj sen plano  
estas bele  
vagi  
ekster voj' —  
simple iri,  
iri  
al nirvano....  
Kaj plenbruste spiri  
inter ĝoj'!

### Si ne venis...

Betulo bele tatuita  
sin klinas apud Kremla tur'  
kaj vagas mi, solul' damnita,  
malantaŭ kremkolora mur'.  
Neniu vokas min... Neniu  
atendas min... Ho ve, enu'!  
Malvarme brilas nur ĉi tiu  
tumultoplana avenu'...

H. Fr.



## 51-a Universala Kongreso de Esperanto

BUDAPEST

30/7—6/8 1966

ENIRVIZO

La partoprenantoj de la 51-a U.K. kaj de la aranĝoj al ĝi ligitaj, kiuj ne loĝas en popoldemokratiaj landoj, por ricevi la hungaran enirvizon devas antaŭe pagi al la konstanta adreso de la U.K. en Rotterdam la sumon de 4 Dol. por ĉiu tago da antaŭvidita restado en Hungarujo. Tiu sumo estos enskribita en la kredito de la kongresano, kiu per ĝi povos pagi la loĝadon, la ekskursojn kaj aliajn kongresajn aranĝojn.

Detalaj klarigoj estas troveblaj sube.

### FOTO-KONKURSO

La temo de la ĉijara Foto-Konkurso estas: «Infanoj ne konas limojn». La konkurso estas dividita en du branĉoj: koloraj diapozitivaj kaj nigreblankaj fotoj. Oni rajtas partopreni per maks. 5 diapozitivaj (36×24 mm). Nelimitita estas la nombro de la nigreblankaj fotoj (min. formato 13×18 cm).

La premioj je dispono po ambaŭ branĉoj konsistas el: 100, 70 kaj 40 ned.gld. resp. por la 1-a, 2-a kaj 3-a premio. Ĉio premiito ricevos krome foto-libron.

### STATISTIKO

(je 14/12 1965). Arg. 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 4, Belg. 9, Braz. 2, Brit. 36, Bulg. 8, Danl. 6, Finn. 3, Franc. 62, G.D.R. 5, G.F.R. 16, Hisp. 4, Hongkongo 1, Hung. 45, Israelo 6, Ital. 10, Jap. 10, Jug. 8, Kuvajto 1, Monako 3, Ned. 33, Norv. 3, Nov-Zel. 1, Pol. 8,

Rum. 2, Sovet. 1, Sved. 21, Svis. 3, Urug. 1, Usono 13. Entute 336 aliĝoj el 32 landoj (pasintjare 551 el 39 landoj).

### ALIĜKOTIZOJ

Ni atentigas ke ekde la 1-a de jan. 1966 la aliĝkotizoj plialtiĝis.

\* \* \*

## Kiel ricevi la vicon por Hungaruj?

Persono, kiu deziras vojaĝi al Hungaruj, prezentas sian peton al la hungara ambasado en sia lando, kiu post certa tempo donas la enirvizon, kiu ĝenerale kostas ĉirkaŭ 3 US \$, aŭ egalvaloron.

Ĝenerale ĉiu persono ricevas enirvizon al Hungaruj por tri semajnoj. Kiu ajn anoncas sin ĉe hungara ambasado aŭ konsulejo, tiu ricevas la vizon, se li/ŝi samtempe garantias, ke li/ŝi vivtenas sin en Hungaruj per sia propra mono. Por tion garantii, la hungaraj instancoj disponigas la vizon, se la vizon petanta persono jam antaŭe ŝanĝas por ĉiu tago 6,50 dolarojn, aŭ egalvaloron, je hungaraj forintoj. Komprenu bone, ĉar multaj miskomprenas kaj pensas ke tiun monon oni devas pagi por la vizo. Tio estas tute erara, ĉar por la vizo oni devas pagi nur ĉirkaŭ 3 dolarojn, sed la supremeciitan sumon por la ĉiutaga vivo oni ŝanĝas je hungaraj forintoj, respektive aĉetas per sia mono hungarajn forintojn. Estas klare ke ĉiu devas pagi en Hungaruj loĝadon, manĝadon, ekskursojn ktp., kaj ĉiujn kostojn kompreneble oni pagas per la forintoj, kiujn oni ricevis kontraŭ sia mono.

Konsiderante ke multaj esperantistoj havas nur modestajn materiajn eblecojn, ni klopodis mildigi tiun regulon kaj akiri pli favorajn kondiĉojn.

Post traktadoj ni ricevis jenajn pli favorajn eblecojn.

Por la kongresanoj, kiuj mendas loĝejojn en privataj domoj, studentaj hejmoj, aŭ en tendaro (pri tio detaloj aperos en la Dua Bulteno), la vizon oni donos, se ili ŝanĝas por ĉiutaga restado nur 4 dolarojn, aŭ egalvaloron.

Por kongresanoj dezirantaj loĝi en hoteloj, restas la kondiĉo de 6,50 dol.: respektive ili pagas la necesan sumon al la hotelo — ekz. unu tago en hotelo por unu persono kun pensio kostas 8—13 dol.

Tiu regulo ne validas por infanoj ĝis 16-jaraĝaj vojaĝantaj kun la gepatroj.

Espereble ĉiu konsentas ke tiu favoro ricevita estas konsiderinda: ja ĉiu persono bezonas por unu tago almenaŭ 4 dolarojn (ĉ. 94 forintoj) por pagi loĝadon, manĝadon, ekskursojn ktp. Ni do esperas ke tiu aranĝo ebligas multaj esperantistoj la aliĝon kaj veturon al la Kongreso.

Ĉiu kongresano devas pagi la necesan sumon (nepre indikante la celon de la pago) al la konto de la Kongreso en Rotterdam — *ne al Budapeŝto*;

La oficejo en Rotterdam kolektas la monon kaj en difinita tempo sendas ĝin al la hungara instanco kun listo de la pagintoj;

La hungara oficejo, laŭ la ricevita listo kaj laŭ la informo pri la pago, sendas invitleteron al la kongresano. En la letero estos indikita la pagita sumo, respektive por kiom da tagoj la kongresano rajtas ricevi la vizon;

La kongresano al sia peto por la vizo aldonas la invitleteron kaj la ambasado donas la vizon.

Oni komprenas ke ĉiukaze oni devas iri al la hungara ambasado en sia lando por la vizo. Ĉiuj diplomatiaj hungaraj reprezentantoj estos informitaj pri tio.

L.K.K. de la 51-a UK

## UNESCO-novajoj

Ĉefurbo de Malia Imperio trovita en Gvineo?

Arĥeologoj el Gvineo kaj Pollando elterigis restaĵojn de granda urbo en Gvineo, proksime de la limo kun Malio. Ili opinias, ke ĝi estis eble la ĉefurbo de la Malia Imperio, kiun fondis en la 13. jc. p.K. la mandingoj, nigrahaŭta popolo el Sudano. Ili povis rekonigi la komercajn centrojn kaj la arabajn kvartalojn, kaj trovis tri gisejojn, el kiuj unu eĉ bone konserviĝis.

Nova strategio en la kampanjo kontraŭ analfabeteco

Kvin grupoj de spertuloj pri la planado de alfabetinstruo forlasis Parizon sub direktado de Unesko por eklabori respektive en Alĝerio, Ekvadoro, Irano, Pakistano kaj Tanzanio. Ilia forvojaĝo signas la unuan stadion de la nova strategio de Unesko, adoptita en la pasinta jaro, laŭ kiu la monda kampanjo de Unesko kontraŭ analfabeteco grave obstaklas ekonomisocialan disvolviĝon. La posta monda kampanjo estos planita laŭ la rezultoj de ĉi tiuj eksperimentoj.

Parolanta tajpilo instruas literumadon

En Usono estas konstruita «parolanta» skribmaŝino por instrui literumadon al infanoj. Kiam la infano frapas klavon de la tajpilo, samtempe aperas la responda litero sur la papero, dum surbendigita voĉo nomas kaj prononcas ĝin. Poste, kiam unu vorto estas fintajpita, la sama voĉo, kiu nomis la individuajn literojn, prononcas la tutan vorton. La maŝino estas intencita por instrui literumadon kaj frazkonstruon al infanoj 7—12-jaraj, sed ĝi estus aplikebla al instruado de fremdaj lingvoj aŭ al

instruado de tajpado al blinduloj. Ĝuste nun oni esploras tiujn eblecojn en la laboratorioj de la Universitato de Pittsburgh.

Modernega presejo en Abiĝano

Abiĝano, ĉefurbo de Ebura Bordo, posedas unu el la unuaj ĵurnaloj de la mondo presataj tute per rotacia ofseta sistemo. La modernega presejo de «Fraternité-Matin», ampleksa 2000 m<sup>2</sup> kaj tute klimatizita, presos ankaŭ lernolibrojn. Ĝia direktoro, D. Fologo, estas ankaŭ stipendiito de Unesko.

Nova eldono de la Biblio

Ĉe la eldonejo Doubleday & Co., Nov-Jorko, ĵus aperis la unuaj du volumoj de nova anglalingva traduko de la Biblio. Ĝi rezultas el kunlaboro de eminentaj protestantaj, romkato-likaj kaj judaj kleruloj kaj estas influita de la arĥeologiaj kaj lingvistikaj eltrovoj de la pasintaj kvindek jaroj.

170 milionoj da telefonoj

En 1954 la mondo havis 90 milionojn da telefonoj. Hodiaŭ estas pli ol 170 milionoj, kaj oni kalkulas, ke en jaro 2000 estos jam 600 milionoj.

Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo

## Honorigo de Robopo

Okaze de la 85-jara naskiĝtago de Hugo Steiner estis fondata «Amika Rondo — Hugo Steiner», al kiu petis aligon aŭ estis de s-ro Steiner invitataj ĝis 1965 cent personoj, kiuj rekonas la laboron de li faritan por Esperanto. La nomoj de la Rondanoj estas eternigitaj sur tabuloj en la Panteono de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Okaze de la 70-jara naskiĝtago de Kapitano Rolf Bugge-Paulsen s-ro Steiner per gratula letero invitis lin al tiu Rondo.

## Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

### Klubo Esperantista en Oslo

dum la aŭtuno (7/9—12/9 65) aranĝis tre sukcesplenan ekspozicion apud kinejo SAGA, sub la moto: *Esperanto — veien til internasjonalt forståelse.*

Oni prunteprenis la grandan Universalan Ekspozicion de U.E.A.. Aldone al pli modernaj libroj pruntedonitaj de niaj klubanoj krom afiŝoj, ĵurnaloj, fotografaĵoj ktp., oni tamen sukcesis aranĝi tre allogan kaj ŝajne interesan ekspozicion, ĉar envenis tre multaj vizitantoj montrantaj fortan intereson. La elmontra fenestro al la strato estis plenplena da esp.broŝuroj kaj ĵurnaloj, kaj tio tre altiris la atenton de la preterpasantoj. Ankaŭ la ĉefgazeto «Aftenposten» vizitis la ekspozicion, fotografis ĝin kaj intervjuis la prezidanton de nia klubo, John Berggreen.

En la salono oni samtempe aranĝis loteriojn por kovri la elspezojn, nome «Dek sur la pinto» kaj kafoburson, kaj krome oni vendis multe da esp.lernolibroj (por kr. 350), disdonis pli ol 1000 broŝurojn pri esp., enskribis 25 partoprenantojn al komencanta kurso, havigis 12 foliojn plenajn de subskriboj al UNO, kaj buŝe parolis kun centoj da vizitantoj pri esp. En samtempe aranĝita demandkonkurso pri esp. partoprenis 78 neesperantistoj. Entute la aranĝo estis treege bona kaj taŭga rimedo por fari informadon pri la esperantomovado.

4/11. Ĉi-tiun fojon Pepita de Caspary redaktis «La Vagabondo»n. C. Støp-Bowitz prelegis pri «Ĉu organismoj travivis la glaciepokon en la Nordo?» — la sama prelego kiun li kun tre granda sukceso faris en la kadro de la Internacia Somera Universitato en Tokyo. — Librovendado kaj ellotum-

ado okazis. Inter la gajnaĵoj estis vivanta kobajo, kiun donacis Pepita de Caspary.

15/11. Kirsten Ek rakontis pri «Impresoj pri Budapeŝto — la urbo de la venontsomera Universala Kongreso». Ŝi plurfoje vizitis la ĉefurbon de Hungarujo kaj komence diris ke oni devas senti la atmosferon kaj ĉarmon de la urbo. Post la milito ĝi estis en ruinoj — ankaŭ la 6 pontoj kiuj kunligas la du urbopartojn Buda kaj Pest estis detruitaj, sed rekonstruiĝis kaj nun estas same — eble eĉ pli bela ol antaŭe. Ili sukcesis savi multajn valoraĵojn, artaĵojn k.t.p., kaj tiuj de nove estas en la muzeoj. En Budapeŝto ekzistas sufiĉe forta kaj vigla Esp.-movado. Kirsten Ek montris ankaŭ kelkajn bildojn de la venontsomera kongresurbo.

Otto Prytz kiu antaŭ kelka tempo klarigis pri la objektpredikato, hodiaŭ klarigis pri la samo, sed en pasiva frazo. — Dum la kafopaŭzo ni regaliĝis per kukoj bakitaj de Ruth Herlofson kaj Emmy Henriksen.

2/12. La prezidanto John Berggreen deziris koran bonvenon al ĉiuj — precipe al la partoprenantoj de la nunaj 5 Esperanto-kursoj, membroj de la fervojista Esp.klubo kaj aliaj gastoj. Li ĝojigis ĉar tiel multaj venis al nia kunveno kiu estis aranĝita kiel Festkunveno por la novaj esperantistoj. En norvega lingvo li donis kelkajn informojn pri la laboro de nia klubo, la programoj ktp. por orientigi la novulojn. Li esperis ke ili aliĝos al la kursoj kiuj komencos en januaro.

La programo komencis per kantado de «La Espero». Poste C. Støp-Bowitz en klara kaj simpla Esperanto parolis pri la Esperanto-movado. Li rakontis pri d-ro Zamenhof kaj lia laboro por krei facilan kaj nekomplikan lingvon por helpi homojn ke ili povu kompreni unu la alian kaj tiel esti amikoj.

La homoj bezonas unu lingvon, kaj tiu lingvo devas esti neŭtrala. La latino estas neŭtrala lingvo, sed tre malfacila kun komplika gramatiko, kaj al ĝi mankas la modernaj vortoj. Tial oni bezonas tute novan lingvon, kiun d-ro Zamenhof prezentis por la homaro en la jaro 1887. Hodiaŭ estas esperantistoj en preskaŭ ĉiu lando en la tuta mondo, kaj la movado estas bone organizita. — La posta programero estis komuna kantado.

Nun la lumo estingiĝis, kaj la filino de Astrid Mansrud — Marianne — aperis kiel «Lucia», en blanka robo, kandelkrono sur la kapo kaj kandelo en mano, dezirante Bonan Kristnaskon al ĉiuj. Dume la Kluba Kantgrupo kantis «Santa Lucia»n, akompanata per tirharmoniko de C. Støp-Bowitz, ni komune kantis «Paĉjo Pikolino».

Poste Astrid Mansrud rakontis japanan fabelon, kaj Asbjørn Syslak ludis muzikaĵojn de Chopin (honore al la kreinto de Esperanto). Ambaŭ rikoltis fortan aplaŭdon. — La lasta programero estis skeĉo: «La somnambulino», direktita de Brynhild Østmo kaj bone ludata de Gerd J. Pettersen, John Berggreen kaj Jan Ekhaugen.

### La Esperantoklubo de Bergen

kunvenis 4/11 en la hejmo de ges.oj Leonora kaj Kristian Sivertsen. — La prez. malfermis la kunvenon kaj legis «Maljuna virinaĉo en oblikvaj ŝuoj».

Ges.oj Sivertsen prezentis la programon: Ĉiuj ĉeestantoj laŭtlegis pecon da historieto, kiuj sursonbendiĝis. Poste ni aŭskultis la sonbendon, kaj diskutis lingvajn aferojn, prononcojn, emfazojn kaj nuancojn, kaj finis la lecionon kantante «Esperanton lernas ni». — Doris Birkelund kaj Ashild Birkenes kantis «Malnova svisa domo» «Ĝuu la vivon» kaj «Alpina Vesperkanto». Ili ankaŭ prezentis novan melodion por la kanto «La Vojo», komponita de nederlanda samideano.

18/11. La prez. bonvensalutis kaj legis «Estu malpacience, Homo». Poste ŝi legis la admonon de U' Thant «Paco kaj bonfarto por ĉiuj». Ŝi menciis diversajn projektojn de UNO.

Johs. Jahren komencis la diskuton pri la agado de UNO, kaj fervora kaj vigla diskuto sekvis. La prez. finis la diskuton legante «La festo de la homo». — Post la paŭzo la prez. referis leterojn kaj cirkulerojn.

2/12. Kunveno okazis en la hejmo de la prez. Elsa Njøten. — Ŝi komencis la kunvenon legante «Kristnaska Infaneto». Unisone ni kantis «Estas paradizo ĉi tie». — Kjell Offerdal prezentis asociadan ludon. La ĉeestantoj laŭvice aktoris en la instrua ludo, kaj ili plej ofte relative rapide trovis la ĝustajn solvojn. — Ges.oj Jahren per lumbildoj montris al ni belajn, kolorriĉajn somermemoraĵojn.

Post la kafopaŭzo ni ekzercis la novan melodion de «La Vojo».

### La Urso, Sarpsborg,

kunvenis 9/12 ĉe ges-roj Eva kaj Stig-Otto Forsberg. La gastigantoj montris belajn lumbildojn pri sia mondvojaĝo, ĉi-foje el Sud-Afriko. — Alia programero estis prezento de esperanto-kantoj per gramofondiskoj. Sekvis regalo de teo kaj bongustaj buterpanoj. Eva Forsberg estis farinta divenkonkuron. Oni trovu laŭvice la unuan literon de respektivaj verkoj. Komponisto aŭ kantisto post ludo de peco da muzikaĵo. — La prez. parolis pri la Zamenhofa tago kaj pri lia vivo.

### La tri verdaj steloj de Løten

kunvenis 9/11. Dum la kunveno oni okupis sin per lingvaj ekzercadoj. — En la kafopaŭzo oni priparolis kiamaniere oni agu dum la subskribkolektado al Unuiĝintaj Nacioj.



## La Jubilea 50-a Brita Kongreso de Esperanto

PENTEKOSTO: 27—30a Majo 1966

Kongresejo:

*St. Andrews Hall, Norwich, Norfolk, Britujo*

Mi esperas ke la Brita Kongreso ne nur estos la plej granda kongreso en la historio de la Brita Movado, sed ankaŭ faros fortan impreson sur la homoj de la angle parolanta parto de la mondo.

Se multaj alilandanaj samideanoj ĉeestos la Kongreson, ili multe helpos kontribui al nia sukceso. — Ne estas necese aldoni ke ili estos bonvenigitaj.

### Korespondu!

Komencanto 25-jara, dez. koresp.: Alfonso Moró, Pécs, Martirok u. 42 V/5, Hungarujo.

22jara studento, Ranko Gavranovic, Cvijiceva 84 a, Beograd, Jugoslavio, dez. korespondi.

17-jara pola knabino sopiras al korespondado kun norvegaj geamikoj. F.ino Aleksandra Juraszek, Liceum Pedagogiczne, ul. Kosciuszki 29, Kety, Polujo.

Grupo da gejunuloj 14—18-jaraj deziras kor. kun gejunuloj en fremdaj landoj. — Skribu al: Bene László, Galambok, Z.M., Hungarujo.

Du indoneziaj samideaninoj tre dez. korespondi kun norvegaj gesamideanoj. Skribu al: F.ino Albertina Lauw, Djln Lautze 68 B, Djakarta V/25 — Indonezio.

24-jara inĝeniero de elektroteĥniko, deĵoranta en maŝinentrepreno Škoda, dez. kor. kun norvega samidean(in)o. Mi interŝanĝas poŝtmarokjn, bildkartojn kaj korespondas pri diversaj temoj. Inĝ. Pavel Štátný, Nemejcová 4, Plzen, Ĉeĥoslovakujo.

Invalido pro denaska paralizo strebas forgesi sian neenviindan situacion per kolektado de bieretiketoj kaj alu-metiketoj, sed ankoraŭ ne posedas norvegajn. Mi esperas ke vi agrablighos mian solecon. Dankon! — S-ro Miroslav Mojžíšek, Ulice odboje 340, Vratimov, Ĉeĥoslovakujo.

Grupo da junaj komencantoj dez. kor. Bonvolu skribi al la kursgvidanao, D-ro Kusztoš Dénes, Uttöröház, Május 1.u.3, Budapest XIV, Hung.

23-jara oficisto tre dez. korespondi. S-ro Gosbert Gehlert, Weide 11/R, 86 Bamberg, Germanujo.

### Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30  
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo  
Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

*Turisma Servo:* Boks 942, Oslo.  
Postgiro 100.32

### Esperantoforlaget A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31  
Postadrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo  
Telefon: 20 20 83

### Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

### La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:  
Johan Hammond Rosbach,  
Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.  
Telefona: 54 7 27